

Semajno de Internacia Amikeco HungaroMania - 25a de februaro 2018

Esperanto 3000 denove organizis sian tradician feston okaze de la Semajno de Internacia Amikeco!

Ĝi estis grandioza festo, dank'al la kunlaboro kun HungaroMania kaj multaj hungaroj kaj interesiĝantoj pri ties lingvo, kiuj aktive helpis en la organizado.

Jam envenante la ejon ni tuj vidis ne nur la efikan akceptejon, sed ankaŭ la viglan merkaton. En ĝi ni povis konatiĝi kun hungaraj kolbasoj, vinoj kaj pluraj aliaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kun revuoj kaj lernejoj. Sed ankaŭ ĉeestis nia propra libroservo, plikompletigita per eroj de Yves Nevelsteen kaj de FEL (dank'al Gerd Jacques). Ankaŭ ĉeestis Katalin Kovats, kun belegaj memfari-taj juveloj el vitro kaj aliaj materialoj.

Pri la prelegoj en la "Esperanto-trako" ni jam raportis en la pasinta numero de ĉi tiu informletero: István Ertl esperantlingve sin demandis "Sándor Szathmári: ĉu hungara Orwell?", Yves Nevelsteen prezentis saĝtelefonajn aŭ etkomputilajn aplikojn rilatajn al lingvo kaj renkontiĝoj, Bart Demeyere enkondukis Esperanton al nederlandlingvanoj kaj Marc Vanden Bempt provis pruvi ke la hungara lingvo estas pli facila ol Esperanto.



Paralele estis amaso da prelegoj pri aŭ en la hungara lingvo. Popoldancado okazis posttagmeze kaj vespere, la vesperan klasikan koncerton bedaŭrinde –pro samtempa manĝebleco- nur trideko da homoj spektis, eblis hungare kunkuiiri.

La ĉefa programero de la posttagmezo certe estis la prezentado de Agria



MuzikFabriko. Tio estas muzikgrupo de la universitato de Eger en norda Hungario, kiu kutime ludas tute alian muzikĝenron. Speciale por HungaroMania ili aranĝis hungaran popmuzikon el la okdekaj kaj naŭdekaj jaroj por klasikaj simfonijaj instrumentoj (violono, fluto, trompeto,...) kompletigitaj de du elektraj gitaroj kaj drumo. Kaj speciale por ĉi tiu koncerto ili flugis el Hungario ĉi tien.

Estis grandioza sperto vidi kaj aŭdi ilin. Praktika detalo de la organizantoj: ni por tiu koncerto de 2x35' luis sonmaterialon je ĉirkaŭ 100.000 eŭroj, alportita kaj starigita vendredon, testita sabaton, uzita dimanĉon kaj reportita en lundo. Imagu la laboron! Sed indas: la sonkvalito en la salono estis bonega.

La reagoj de la partoprenintoj versajne diras pli ol niaj propraj vortoj. Jen nur kelkaj de la jam alvenintaj:

"Dankon pro la invito al Hungaromania kaj gratulojn pro la bona organiza laboro kaj sukcesoj. Mi vere ŝatis partopreni."

"Hartelijk dank voor de geweldige dag. Het was waarschijnlijk heel veel werk, de voorbereiding. maar er waren denk ik wel weer veel bezoekers, die allemaal enthousiast waren. Petje af voor jullie!"

"Ook deze keer was het een geslaagde editie!

Ik heb vooral genoten van de uiteenzetting van Charlotte Messiaen over Kodály. Is zij ook Hongaarse? Na het middagmaal zijn we ook naar de muziek voor kinderen van Júlia Bucz geweest. Dat was ook heel goed (Ik denk dat er meer volwassenen waren dan kinderen). En daarna natuurlijk naar Táncház. Ook de gulyás was voortreffelijk.

Heel erg bedankt voor de puike organisatie. Hopelijk hadden jullie niet te veel werk achteraf."

"Szeretnék gratulálni a Hungaromania szervezőinek.

Nagyon köszönjük a lehetőséget, hogy ott lehetünk.

Igazán nagy élmény volt résztvenni és látni a boldog arcokat egy igazi túrós/makos rétes láttán!

Köszönjük és kívánjuk, hogy nagyon sok ilyen sikeres rendezvény legyen a jövőben is."

(We zouden de organisatoren van HungaroMania willen gelukwensen. Veel dank voor de mogelijkheid erbij te mogen zijn. Het was echt een grote ervaring deel te nemen en de gelukkige gezichten te zien bij het zien van een echte kwarktaart of strudel! We danken u en hopen dat er nog veel gelijkaardige succesvolle bijeenkomsten mogen zijn in de toekomst).

Week v/d Internationale Vriendschap / HungaroMania: zo. 25.2.2018

Fotoj: www.hungaromania.eu/nl